[noto de Yamaguti S.]
Ĉi tie mi prezentas la tradukon de Tannniŝoo fare de Sasaki Kentoku. Kiel vi legas en lia postparolo, lia traduko ne estas kvalite bona kaj multaj eraroj abundas. Mi korektis kelkajn punktojn. Sed plena korekto eble detruas lian stilon, tial mi principe lasis lian tradukon laŭeble tiel, kiel estas en la origilano. Aliaj esp-istoj - ankaŭ mi mem - provis traduki la saman tekston. Se al vi plaĉas, bv. kompari ilin.

TANNIŜOO

La parolo de Sanktulo Ŝinran
kaj
la bedaŭro de Jien pri herezo

歎異鈔

tradukita de Sasaki Kentoku 佐々木憲徳

TANNIŜO PARTO 1

ANTAŬPAROLO

Mi konfidence devas pripensi pri la vivinta tempo de mia majstro kaj nun-tempo post lia morto, ĉar mi bedaŭras ke iuj homoj protestas kontraŭ la vera kredo kion iam la mortinta majstro instrukcis al la serĉantoj de vera vojo, kaj ankaŭ malĝojas ke de nun ili havos dubon pri la vojo de kredo. Kiel ni povus eniri en unu pordegon de facila ago, se ni ne havus bonan kondukanton? Ne malordigu la justan doktrinon de ali-forto per viaj propraj malortodoksaj opinioj! Tial mi iom intencas skribi la parolon de mia majstro kiun mi nun memoras klare, por forigi la dubon de nia samideano. (k. t. p)

Ĉapitro 1

Kiam ni estas ekpensanta pri la vokado de la Budha nomo, kredinte ke ni povas naskiĝi en la purlando, savite per la mirindaĵo de la promesa voto, tia momente ni gajnas la profiton ke ni estas protektata en la Budha lumo kaj eterne ne forlasata de la Budho Amita. En la originala voto de la Budha Amita, ni ne estas distingata ke la homoj estas ĉu juna aŭ maljuna kaj ĉu bona aŭ malbona, kaj nur la kredo estas bezonata al ni, ĉar la Amita voto estis ĵurita por homoj kiuj havas la profundan pezan pekon kaj fortan pasion. Se ni kredas la originalan voton, ĉiam ni ne bezonas alian bonon, ĉar nenie estas pli bona ago ol la vokado de la Budha nomo. Kaj ni ne timas nian malbonan agon, ĉar nenie estas malbono kio malhelpas la originalan voton de Budho Amita (k.t.p)

Ĉapitro 2

La kialo por kio vi venis al mi en urbo Kjoto, malatentante riskon de via vivo kaj transirnte landlimojn pli ol dek, estas por aŭskulti al mi la vojon de la naskiĝo en purlando. Dume, se vi malkontente pensos ke mi scius la vojon krom la vokado de la Budha nomo kaj havus alian profundan doktrinon, tio ĉi estas tre erarega. Se vi volas aŭdi alian doktrinon, vi vizitu superajn erudiciulojn en urbo Nara aŭ monto Hiei, kaj vi detale demandu al ili gravan signifon pri la naskiĝo en purlando! Mi, Ŝinran nur kredas la parolon de la bona majstro Honen, ke mi estas savata, ke mi estas savata per la Budha nomo. Tie estas nenio diferenca el tio. Mi tute ne scias, ĉu la vokado de Budha nomo estas la kaŭzo de la naskiĝo en purlando, aŭ la ago gvidanta en la infero. Eĉ se mi enfalus en la inferon trompite de sanktulo Honen, mi neniom bedaŭras pri tio. Se spite tion ke mi havas kapablecon progresi al la Budha rango, klopodante ĉiujn purajn agojn krom la vokado de la Budha nomo, mi faliĝus en la inferon per la vokado de la Budha nomo, mi bedaŭrus ke mi estus trompita de sankta Honen. Sed mi ne bedaŭrus pri tio, ĉar mi nepre devas enfali en la inferon, pro ke mi ne povas fari ĉiajn purajn agojn. Se la originala voto de la Budho Amita estas vera, la instruo de de Ŝakjamuni povas esti malvera. Se la instruo de Ŝakjamuni estas vera, la klarigo de Ĵendo [tiel!] (Shan-tao) ne povas esti falsa. Se la klarigo de Ĵendo estas prava, la parolo de Honen ne povas esti falsa.

Se la parolo de Honen estas prava, ankaŭ la parolo de Ŝinran ne povas esti vana, ĉu ne? Konklude mia opinio de la kredo estas kiel supre dirita. Do, ĉu vi kredus la vokadon de la Budha nomo, aŭ ne, tio estu elektata laŭ viaj voloj! (k.t.p.)

Ĉapitro 3

Eĉ bonuloj ankaŭ povas naskiĝi en la purlando; tial malbonuloj des pli facile. Dume, ordinaraj homoj ĉiam diras pri tiu problemo, “Eĉ malbonuloj povas naskiĝi en la purlando, tial bonuloj des pli facile.” Tiu ĉi diraĵo enhavas ian rezonon, sed perdas la signifon pri la ali-forto de la originala voto, ĉar homoj kiuj faras siajn proprajn bonfarojn por naskiĝi en la purlando, ne havas tute la kredon por savo de la ali-forto. Tial ili ne akordiĝas kun la originala voto de la Budha Amita. Kontraŭe, se homoj forlasas la penson pri sia forto de bonfaro, kaj kredas la ali-fortan savon de la originala voto, ili povas naskiĝi en la vera rekompencita purlando, ĉar kompatinte ke la homoj, kiuj havas la pasion kaj pekadon ne povas forlasi la mondon de vivo kaj morto per sia pura ago, Lia originala volo kun kiu Li ĵuris la voton, estas por savi malboonulojn. Tial malbonuloj, kiuj kredas la ali-fortan savon, estas la plej bonvenotaj kiel kaŭzuloj al la purlando. Pri tio majstro diris “Eĉ bonuloj ankaŭ povas naskiĝi en la purlanodo, tial malbonuloj des pli facile.”

Ĉapitro 4

Pri la pura amo ekzistas la diferenco inter la sankta voja pordego kaj la purlanda pordego. La pura amo de sankta voja pordego estas kompati, simpatii kaj varti ĉiujn vivaĵojn, sed neniu laŭvole preskaŭ povas savi ilin. La pura amo de purlanda pordego estas jene: post kiam frue atingis al la Budheco en purlando per la savo de Budha nomo, ni libervole donos la favoron al ĉiuj vivaĵoj per la granda amo kaj mizerikordo. Kvankam nuntempe en tiu ĉi mondo ni simpatie kompatas ĉiujn vivaĵojn, ni ne povas savi ilin kiel ni scias. Sekve tia amo ne perfektiĝas de komenco ĝis fino. Per tia rezono, mi konkludas ke kiam ni nur vokadas la Budhan namon, tiam tie estas la gradega pura amo kiu daŭras por eterne. (k.t.p.)

Ĉapitro 5

Eĉ unufojn mi Ŝinran ankoraŭ ne vokis la Budhan nomon por fila obeemo al la mort intaj gepatroj, ĉar ĉiuj vivaĵoj iam estis miaj gepatroj aŭ gefratoj en la tri mondoj. Kiam plej proksime mi atingos al la Budheco, tiam mi povos savi ilin. Se la Budha nomo estus la bono kiun mi mem faris, mi povus savi miajn mortintajn gepatrojn per la donado de mia profito kiu estis akirita de mi per la vokado de la Budha nomo. Sed se ni forĵetas la penon per nia mem-forto kaj tuj atingas al la Budheco per ali-forto. Kvankam ili subakviĝus en kia ajn sufero inter ses mondoj aŭ kvar vivoj, unue mi povos savi niajn parencojn per mirinda maniero. (k.t.p.)

Ĉapitro 6

Personoj kiuj havas speciale praktikon pri la vokado de Budha nomo, estas reciproke disputantaj pri sia disĉiplo, insistante “li estas mia disĉiplo.” aŭ “li estas disĉiplo de aliulo.” Tiu ĉi estas tre bedaŭrinda. Ŝinran ne havas eĉ unu disĉiplon, ĉar se li speciale vokus la Budhan nomon per mia propra peno, li estus mia disĉiplo, sed li vokas la Budhan nomon per la mirinda maniero de la Budho Amita. Tial se mi diras ke li estas mia disĉiplo, tiu estas tre malorda eraro. Kiam ni havas la rilaton por unuiĝi, tiam ni kolektiĝos al sama

grupo. Sed en kontraŭa kondiĉo ni disiĝos el la sama grupo. Kvankam iuj malobeante al sia instruisto akompanas al alia homo kaj vokas la Budhan nomon, ni ne povas riproĉi ilin dirante ke ili ne povas naskiĝi en la purlando k. a. Ĉu li volas repreni la kredon de aliulo kiun li jam estis donita de la Tathagato [tiel!]? Se ni koincidis al la rezono de ali-forto, ni nature dankos favoron de la Budho kaj ankaŭ scios la bonvolon de nia instruisto. (k.t.p.)

Ĉapitro 7

La kredulo kiu vokadas la Budhan nomon estas paŝanta la solan vojon per kiu li povas transiri ĉiam obstrukcon. La kial estas ĉi-sube: ĉiela kaj tera Dioj respektas la kredulon de la Budho Amita. Ankaŭ diablo kaj herezulo ne malhelpas lin. Iliaj pekoj kaj malbonoj ne rezultas kompenson de puno. La kredo de la Budho Amita estas pli eminenta ol ĉia bona konduto. Tial la kredulo kiu vokadas la Budhan nomo estas vere iranto sur la libera unu-vojo sin mem [tiel!]. (k.t. p.)

Ĉapitro 8

La vokado de la Budha nomo ne estas la ago de sinkulturo, nek la boneco por la serĉanto de vera vojo, ĉar antaŭa okaze [tiel!] tio signifas la agon nerilatantan al lia konsidero, kaj malantaŭa okaze [tiel!] tio signifas la bonon kiun li ne povas krei de sia penlaboro. Tiu ĉi tute estas savo de ali-forto aparta el sia forto. Tial la vokado de Budha nomo ne estas sinkulturo aŭ sia propra boneco. (k. t. p.)

Ĉapitro 9

Kvankam mi vokadas la Budhan nomon, mi ne havas elkoran ĝojegon kaj delicon, ankaŭ mi ne deziras rapide naskiĝi en la purlando. Pro kio estas ĉi tio? Kiam disĉiplo Juien tiamaniere demandis al sia maistro Ŝinran, li repondis kiel jene. Mi ankaŭ estis havinta la saman dubon pri tiu ĉi afero, tial mi kaj vi estas prenantaj saman situacion en religia konstio. Profunde mi pensas tiun ĉi aferon. Se ni gajnis la kredon, ni devas esti tiel ĝojega kiel ni saltas al la ĉielo aŭ dancas sur la tero. Sed ju pli ni ne povas ĝoji, des pli ni devas pensi ke ni certe naskiĝos en la purlando pro ali-forto. La kaŭzo pro kio ni ne sentas la delicon de la savo haltigante nian koron, devenas de nia pekema pasio. Dume, la Budho Amita antaŭe sciinta tion promesis ke Li savas la ordinarajn homojn kiuj origine havis ĉiajn pekemajn pasiojn. Tial ni povas scii ke la amema vola promeso de ali-forto estis farata por ordinaraj homoj kiel ni, kaj pro tio ni oferas pli multe la profundan kredon. Ankaŭ, kiam ni estas iom malsana, ni miras ke ni estus mortonta anstataŭ ni deziras rapide naskiĝi al la purlando. Tio devenas de nia pekema pasio. De nekalkulebla pasinta tempo ĝis nun, ni ne volas forlasi la suferan kaj ĉagrenan hejmlandon, kaj ne sopiras al la purlando en kiu ankoraŭ ni ne naskiĝis. Tiel vere ĉi tiu estas pro nia tre intensa egoisma pasio. Tamen kiam daŭre havante la koran deziron por vivadi en tiu ĉi mondo, ni perdas la kondiĉon de nia viva ekzisto, kaj devas morti malpli forte, tiam ni naskiĝos en la purlando. La Budho Amita plimulte kompatas la homon kiu ne volas rapide naskiĝi en la purlando. Pri tio, ni pli kaj pli povas kredi la grandan amon kaj voton, pensante ke ni iam certe naskiĝos en la purlando. Se ni havus elkoran ĝojegon kaj delicon kaj ankaŭ rapide deziras la naskiĝon en la purlando, ni timus ke ni ne havus la la pekeman pasion. (k.t.p.)

Ĉapitro 10

La plano de la Budha nomo por la savo estas absolute perfekta, tial ni tute ne bezonas nian konsideron pri Lia savo, sekve devas esti dirata tio ke senkonsidero estas justa konsidero. Ĉar la Budha nomo kiu estis donata per ali-forto de la Budha promeso, ne povas esti admirata aŭ parolata per la penso de ordinara homo, kaj estas transcendinta la funkcion de konscio. Tiel Ŝinran parolis por ni.

PARTO 2

APARTA PAROLO

Nu, kiam Ŝinran malnova tempe estis vivinta, serĉantoj de religia vero malfacile venis al ĉefurbo Kjoto el malproksimaj provincoj kun sama celo. Ili deziris naskiĝi en la purlandon estonte per sama kredo, kaj en sama tempo ili ricevis instrukcion de majstro. Malantaŭe la nombro de junaj kaj maljunaj homoj kiuj iris al la majstro kune kun ili kaj vokis la Budhan nomon, estis multenombraj. Nu mi aŭdis ke proksima tempe iom da ĉi tiuj homoj estas insistanta malsaman opinion kion Ŝinran ne parolis. Mi montros tiel-ajn malrezonajn dirajĵojn ĉisube.

Ĉapitro 11

Tie estas la problemo jene; "kiam iom da homoj rekontis al la malkleruloj kiuj estas vokadanta la Budhan nomon, surprizas ilin per jena demando; ĉu vi vokas la Budhan nomon pro la kredo de la mirinda promeso, aŭ pro la kredo de la mirinda nomo. Tiam li ne ne klarigas detale pri du mirindoj kaj konfuzas korojn de la malkleruloj." Rilate al tiu afero ni certe devas pripensi per la profunda prudenteco. Per mirinda forto de la promesa voto, la Budho Amita kreis facilan memoron kaj simplan vokadon de la Budha nomo, kaj ankaŭ promesis ke Li renkonte iros al la homoj kiuj vokas la Budhan nomon. Unue, ni vokas la Budhan, kredante tion ke ni povas forlasi la iluzian mondon de naskiĝo kaj morto, pro mirinda forto de amega kaj granda voto. Ni kredas ankaŭ tion ke eĉ voki la Budhan nomon estas pro la favoro de la Budho Amita. Ĉio estas laboro de Budho mem, kaj neniom da niaj laboroj enmiksas. Do, ni povos naskiĝi en la veran rekompencan purlandon decante al la originala voto de Budho Amita. Se mi precipe kredas la mirindon de la originala voto, mi kredas samtempe la mirindon de la nomo. Tial mirindoj de promesa voto kaj sankta nomo estas unu kaj tute ne malsamaj. Due tiu kiu enmiksante propran penon, pensas kiel du manierojn asiston aŭ obstrukcon pri la savo de la Budho Amita laŭ sia bona aŭ malkona kondukto, ne kredante la mirindon de la promesa voto pensas la vokadon de la Budha nomo kiel sian propran agon kaj pli penadas por naskiĝi purlandon en sia koro. Tiuj ĉi homoj ankaŭ ne kredas la mirindon de la Budha nomo. Sed kvankam eĉ li ne havas la kredon, li naskiĝos en la lando nomata "ekstrema lando aŭ sabota aroganta lando aŭ duba kastelo aŭ feta sanktejo" kaj pro dudeka voto promesita por plenumi la celon de vera naskiĝo, fine eniros en la vera rekompenca purlando. Tio estas pro la forto de la mirindo de la Budha nomo, kaj ankaŭ por la mirindo de la promesa voto. Tial la promesa voto kaj la Budha nomo estas nur unu.

Ĉapitro 12

Ĉi tie estas la problemo jene: "Tiu, kiu neniam legas sutrojn kaj nek studas komentariojn, ne estas certa pri la naskiĝo en la purlando." Tiu ĉi estas treege senvalora opinio. Ĉiuj sanktaj libroj kiuj estas skribataj pri la vera doktrino de ali-forto, montras ke homoj kiuj kredas la promesan voton kaj vokas la Budhan nomon, gajnos la Budhecon estonte. Krom tio, kia lernado estas necesa por la naskiĝo en la purlando? Homoj kiuj fakte konfuziĝas pri tiu rezono, ĉiam devas peni por scii pli bone la signifon de la originala voto, per

diligenta lernado. Se kvankam li legas la sutron kaj lernas la komentarion li ne komprenas la ĝustan signifon de la sanktaj libroj, tio estas tre kompatata. La Budha nomo facile povas esti vokata por homoj kiuj tute ne lernas kaj ne scias la rezonon de sutro kaj komentario, tial tiu estas nomanta la vojo de facila ago. La skolo kiu forte insistas la lernadon, estas la pordego de sankta vojo, kiu estas nomanta la vojo de malfacila ago. Homoj, kiuj erare faras la lernadon kaj volas egoisman profiton kaj famon, estas dubeblaj pri sia naskiĝo en la purlando. Sekve jen estas pruvata en iu komentario. Nuntempe, la disputo pri Budhismo estas projektata inter la homoj, kluj sole vokas la Budhan nomon, kaj sinkultuloj de la sankta voja pordego. Ili diras unu la alian, "nia propra sekto estas pli eminenta ol via sekto," aŭ "via sekto estas malpli eminenta o nia sekto." Tial tie aperos la antagonisto pri la sekta signifo kaj ili ankaŭ insultos la justan doktrinon. Ĉu tiam ili prefere ne detruas kaj riproĉas sian propran doktrinon? Kvankam ĉiuj homoj de aliaj sektoj diras ke la vokado de Budha nomo estas la instruaĵo por malsaĝuloj kaj ankaŭ tio estas malprofunda kaj malsupera, ni tute ne disputas kontraŭ ili. Do, la oridinaraj homoj kiuj havas maleminentan kvaliton kiel ni mem, kaj ne scias unu literon, estas savata senkondiĉe per nur unu kredo laŭ la instruo de bona gvidanto, kvankam tio estas verŝajne bagatela por la eminentaj homoj, ĝi estas senkompara savo por ni. Eĉ se la doktrino de alia sekto estas eminenta, ni ne povas agi tiun pro nia maleminenta talento. La vera koro de ĉiuj Budhoj estas tio ke mi kaj ĉiuj aliaj forigas la iluzian mondon en kiu ni devas naskiĝi kaj morti. Se ni ne kontraŭas al ili kun malŝatinda sintenado, kiu el ili venas malamike al ni? Ankaŭ ĉia peko aperas tie, kie ni disputas kun la alia. La sankta dokumento diras "saĝulo devas forĵeti la disputon." La mortinta majstro diris jene: "la Budho parolis ke iom da homoj kredos tiun ĉi doktrinon, sed aliaj riproĉos tion." Nur ni kredas la instruon de la Budha nomo, kaj la aliaj riproĉas tion. Tial ni povas scii ke Budha parolo estas vera, kaj nia naskiĝo en la purlando estas firma. Se riproĉuloj ne estas en tiu ĉi mondo, kontraŭe ni havos dubon en la la fakto ke riproĉuloj nenie ekzistas. Kiam ajn ni diras tiel: ni ne volas devige riproĉon de la alia. Nur ni volas montri ke la Budho antaŭe konis ambaŭ kredon kaj riproĉon aperontan estonte, tial Li predikis por neniigi la dubon de la homoj. Ĉu homoj nuntempaj volas lerni, nur por ĉesigi alian riproĉon aŭ sinpretigas disputi nur por disputi? Se ni lernadas, ni povas scii la originalan voton de la tathagato, kaj kompreni la grandan signifon de la amega deziro. Ankaŭ al aliaj homoj kiuj estas maltrankvilaj pri la naskiĝo en purlando pro sia malsaĝeco, ni devas paroli ke la originala voto ne elektas bonan aŭ malbonan kaj puran aŭ malpuran pri la savo. Tiaj paroluloj ja havos valoron de instruistoj. Se li malofte vidas honestan homojn kiu vokas la Budhan nomon konsentante al la originala voto, kaj devigas lernadi al ili por la savo, tio estas diabla obstrukco pri la dharmo kaj ofendinda malamiko kontraŭ la Budho. Li ne nur havas la kredon de ali-forto sin mem, sed gvidos la alian al erara vojo. Tial vi humile timu ke vi malobeas al la koro de la mortinta majstro, samtempe vi devas malĝoji ke tiu ne estas la originala voto de la Budho Amita!

Ĉapitro 13

Tie estas la problemo jene: "Se li ne timas sian propran malbonaĵon pro tio ke la originala voto de la Budho Amita estas mirinda, ankaŭ li ne povas naskiĝi en purlando, ĉar li estas tro fiereca por la originala voto." Sed tiu ĉi opinio estas dubo pri la originala voto, kaj li ne komprenas pasintan kaŭzon de la agoj bonaj aŭ malbonaj. Se la bona koro

aperas en nia konscio, tiu devenas de la pasinta bona ago, kaj la vekiĝo de malbona penso en nia koro estas pro la influo de pasinta malbona ago. La mortinta sanktulo Ŝinran diris: “Kvankam ni faris tiel malgrandan pekon kiel la polveron sur la pinto de la lanoj de leporo aŭ ŝafo, neniom povas esti tio krom la kaŭzo de pasinta ago.” Iam inter sanktulo Ŝinran kaj Juien estis jena dialogo. Ŝ: “Ĉu vi kredas mian diraĵon?” J: “Jes.” Ŝ: “Se vi kredas min, ĉu vi neniam malobeas min?” J: “Jes bone.” Ŝ: “Ekzemple, vi mortigu mil homojn, tiam vi nepre naskiĝos en la purlando.” J: “Spite al via demando mi ne povas mortigi eĉ unu homon, mi pensas.” Ŝ: “"Se estas tiel, kial vi diris ke vi obeas la vorton de Ŝinran? Pri tio, vi sciu la veron! Se vi laŭvole povas fari ĉian aferon, vi facile mortigos mil homojn, kiam mi ordonas vin ke vi mortigu mil homojn por la naskiĝo en la purlando. Sed vi ne povas mortigi eĉ unu homon, ĉar vi ne havas la respondan pasintan agon. Kvankam vi ne mortigias alian homon, sed ne estas pro tio ke via koro estas bona, kaj kontraŭe vi povus mortigi eĉ cent aŭ mil homojn pro via pasinta ago, kvankam vi ne volas.” La signifo de la vortoj supre diritaj de Ŝinran estas kiel jena. Ni ne estas savata pro nia bona koro, aŭ ni ne estas malsavata pro nia malbona koro, kaj ni nur estas savata pro la mirindo de la Amita voto. En antaŭ-tago tie estis iaj disĉiploj kiuj falis en maljusta opinio, kaj ili insistas ke intence ni devas fari la pekon por naskiĝi en la purlando, ĉar la Amita voto estis ĵurita por savi la homojn kiuj pekas. Kiam pro tiaj disĉiploj sanktulo Ŝinran estis ĉiel riproĉita, li skribis al iuj disĉiploj leteron en kiu li instruis ĉisube: malprave estas, ke tamen kuracilo troviĝas ĉi tie, vi prenu venenon. Tiu estas por ĉesigi tian malpravan opinion, kaj tute ne esprimis ke la malbono estas obstrukco por la naskiĝo en la purlando. Se ni povas kredi la originalan voton nur pro la efiko de moralordona ago, kiel ni povas forlasi la iluzian mondon de naskiĝo kaj morto? Ec tiel malsaĝulo kiel ni mem estas savata pro la kredo de originala voto, tial ni vere estu fieraj pro la originala voto! Sed la malbona ago, kiu ne havas kaŭzon pasinte, nenial povas esti farata de ni. Tie estas diversaj homoj por la vivo, iuj faras retfiŝadon kaj fiŝhokadon en la maro aŭ la rivero, iuj kaptas la beston kaj la birdon en la monto aŭ la kampo, iuj faras komercon, iuj faras kulturon en la rizejo kaj la kampo. Ĉi tiuj diversaj homoj egale devas agi kian ajn konduton laŭ la pasinta ago. Malgraŭ tiu ĉi parolo de la majstro, nuntempe afektante kiel veraj kreduloj ili diras ke nur bonaj homoj povas fari la vokadon de Budha nomo, kaj reklamas en seminario, ke homo kiu malobeas al tiu kaj tiu afero ne eniru en tiun ĉi ĉambron. Tiaj diroj signifas ke ili ekstere afektas la bonan saĝulon kaj kontraue havas la falsaĵon en sia koro. Ĉu ne? La peko, kiun ni faris pro la fiereco al la originala voto, ankaŭ kaŭzas de la pasinta ago. Tiel ni devas lasi la bonan kaj malbonan kondutojn laŭ la pasinta ago, kaj nur konfidi la originalan voton. Tio ĉi estas la ali-forto de la Budha promeso. Pri tio, “Juiŝinŝo” skribris kiel jene: “Se vi pensas ke la Budho Amita ne povas savi vin kiu havas nur pekon, ĉu vi pensas kiom da povo havas Li?” Eĉ kiam ni havas la konscion fierantan la originalan voton, ni povas certe akiri la kredon de ali-forto. Ĝenerale, se ni nur kredus la originalan voton, post kiam ni trarompis ĉian malbonan agon kaj pasion,tio estus pli bona, ĉar ni ne havos la koron kiu fieras la originalan voton. Sed se ni trarompis ĉian pasion, ni fariĝus la Budho, kaj por la Budho, kiamanie povas esti uzebla la voto pri kiu Bodhisatvo Hozo pensis dum kvin kalpoj? Verŝajne homoj kiuj admonas la fierecon de la originala voto posedas la pasion kaj malpuron. Ĉu tiu ne fariĝas fiero de la originala voto? Kian malbonon vi diras la fiero de la originala voto ? Kian malbonon vi ne diras la fiero de la originala voto ? Sekve tia insisto estas plie infaneca.

Ĉapitro 14

Tie estas la probremo jene: “Ni devas kredi ke ĉe unu voĉo de la vokado de la Budha nomo perdiĝas okdek cent milionaj kalpajn gravajn pekojen. Tiu ĉi opinio estas ke la pekuloj kun dek malbonoj kaj kvin malobeoj neniam vokas la Budhan nomon en ĉiutaga vivo, kaj vokas unu voĉon de la vokado de la Bodha nomo instruate de la bona instruitulo lasta momente. Tia tempe ĉe unu voĉo perdiĝas niaj okdek cent milionaj kalpaj pekoj, kaj ĉe dek voĉoj perdiĝas niaj dekoble okdek cent milionaj kalpaj pekoj, kaj ni povas naskiĝi en purlando. Tiu ĉi eble estis montrita per la vorto de unu voĉo aŭ dek voĉoj por sciigi la pezecojn de dek malbonoj kaj kvin malobeoj. Tio estas la profito perdigi pekon. Sed ankorau tiu ne atingas al nia kredo de la ali-forto, ĉar kiam ni estas lumigata per Amita lumo, ni povas aŭdi la alvokon de la Budho Amita por la unua fojo kaj samtempe la kredo kiel diamanto estas donita al ni. Tial post tiu tempo, ni nepre troniĝas sur la rango de la decidita Bodhisatvo, ankaŭ post morto ni transforminte nian propran egoisman pasion havas la konvinkiĝitecon de la absoluta inteligento. Se tie ne estas la amega voto, kiamaniere tia malsaĝaj pekuloj povas liberiĝi el la mondo de naskiĝo kaj morto? Kiam ni pensas tian fakton, ĉiom da vokado de la Budha nomo dum nia tuta vivo devas esti dank-rekompenco por la favoro de la tathagata amego kaj treega bonvolo. Tiu, kiu kredas ke mi povas rompi la pekon kiam ni ofte vokas la Budhan nomon, devas peni por rompi la pekon dezirante la naskiĝon en la purlando. Se estas tiel, ĉar ĉia penso dum nia vivado, estas nenio krom la katena ŝnuro de la naskiĝo kaj morto, ni devas daŭrigi konstante la vokon de la Budha nomo ĝis la fino de la vivo por naskiĝi en la purlando. Sed ĉar la rekompenco de pasinta ago estas limigita, ni povus renkonti neatenditan aferon, aŭ suferi de la malsano. Se tiel ni ne havas la justan penson lastatempe, eble ni ne povas voki la Budhan nomon. Tiuokaze, per kia maniero vi rompas la pekon kiun vi faros ĉe mortonta tempo? Ĉu vi pensas, ke se via peko ne malaperas, vi ne povas naskiĝi en la purlando? Nu, se ni kredas la voton en kiu la Budho Amita ĵuris protekti en sia lumo kaj ne forlasi ĉiujn vokantojn de sia nomo, kvankam ni faras pekon por neatendita neatendita afero, kaj ne povas voki la Budhan nomon lastatempe, ni frue povas kompletigi la naskiĝon en la purlando. Ankaŭ ĉe la fakto, ke ni povas voki la Budhan nomon, ni komprenas tion, ke ju pli ni proksimiĝas al fina tempo kiam ni gajnos la Budhecon, des pli ni certe kredas la Budhon Amitan, kaj dankas al la favoro de Budho Amita. Se iu pensas ke li povas rompi sian pekon vokante fervore la Budhan nomon, li ne havas la kredon de ali-forto, ĉar tio estas sendependa koro kaj propra volo kiu preĝas la bonordan penson mortatempe.

Ĉapitro 15

Tie estas la problemo jene: “La homoj kiuj posedas la egoisman pasion, jam akiras la Budhecon.” Tia opinio estas treega eraro. Ili diras “La homoj havante la koron kaj korpon ricevitaj de siaj gepatroj fariĝas la Budho.” Tiu ĉi estas la originala signifo de la sekreta mantra sekto, kaj estas la konkludo korpigata de tri sekretaj agoj. Ankaŭ ili diras, “Ses fundamentoj de korpo kaj koro fariĝas puraj.” Tiu opinio estas la parolo de la ekajana sekto de dharma floro, kaj la konkludo estas la rekompenco de kvar komfortaj agoj. Sed ambaŭ estas servo de pli eminentaj homoj kiuj povas efektivigi la malfacilan agon, kaj estas la konvinka pruvo kiu sukcesigis la spekulativan agon. Diference je tio, la doktrino

de la purlanda sekto laŭ ali-froto estas la vojo per kiu ni povas gajni la Budhecon en estonta tempo pro nur la destinita kredo. Ankaŭ tiu ĉi estas la sava maniero en kiu la bonaj kaj la malbonaj ne estas distingitaj kaj per kiu la maleminentaj homoj povas iri facile la vojon de la purlando. Ĝenerale, ni ne povas facile rompi la egoisman kaj malbonan obstrukcon en nia estanta vivo. Tial homoj kiuj sin ekzercas en la mantra sekto kaj la dharma-flora sekto, plie preĝas por gajni korpiĝon de la Budheco en jena naskiĝo. Ju pli ni ne havas la rezulton de moralordono kaj inteligento, des pli ne povas gajni la Budhecon en tiaj sektoj. Sed se eĉ tiaj malsaĝuloj enŝipiĝante en la ŝipo de la Amita voto, transiris la suferan maron de naskiĝo kaj morto, kaj alvenis al la bordo de la Amita rekompenca purlando, tiam ili rapide malaperigos la nubon de egoisma pasio, kaj frue aperigos la maliluzian lumon de vera naturo. Kiam ili povas doni la profiton de savo al ĉiuj homoj, partopreeante al la Budha lumo liberiĝinta trans obstrukcon de ĉiuj mondoj en dek flankoj, troviĝas al ili la Budheco. Ĉu la homoj kiuj gajnus la Budhecon ĉe sia korpo en estanta tempo, kiel la Budho Ŝakamuni, aperigus diversajn korpojn de la savo havante tridek du figurojn kaj okdek vicfigurojn, ankaŭ ili predikus la dharmon kaj donus la profiton por la aliaj? Se tio estas ebla, ni povas diri ke ni povas gajni la originalon de la Budheco en estanta tempo. Ŝinran versis jene en la psalmo japanlingve: “Kiam la kredo kiel fortika diamonto al la ni estas akirita, la kora lumo de la Amita protektas nin, kaj ni longe forlasas naskiĝon kaj morton.” Tio ĉi signifas jene: kiam ni ricevas la kredon, jam nun ni ne renaskiĝas inter ses mondoj, ĉar ni estas savitaj kaj protektataj en la lumo de la Budho Amita. Tial la psalmo kantis: “Longe forlasis naskiĝon kaj morton.” Sed tio ĉi ne estas gajno de la Budheco en estanta tempo. Se tio ne estas tiela, tio devas esti la mizera sofismo. Mortinta majstro diris al ni, “En purlando vera sekto, ni en estanta vivo kredas la originalan voton, kaj estonta tempe gajnos la Budhecon en tiu purlando.”

Ĉapitro 16

Iuj homoj diris jene: “Se la kreduloj koleras nature, aŭ faras malbonon, aŭ disputas kun samideano, ili devas certe konfesi pri tiuj aferoj.” Ĉu sed la signifo de tiu ĉi diro havas la intencon ke ni devas rompi malbonon kaj praktiki bonon? Se estas tiel, tio ne estas ĝusta. La kreduloj, kiuj deziras ekskluzive la veran vojon, havas nur unufojan konfeson por konvertiĝo. Tie estas iuj homoj kiuj antaŭe neniam sciis la originalan voton. Poste ricevinte la Amitan inteligenton, ili pensas ke ili ne povas naskiĝi en purlando laŭ ĝisnuna pensado. Sed povas naskiĝi pro la kredo obeema al la originala voto turninte antaŭan koron. Tiutempe la stato de koro nomiĝas la konfeso por konvertiĝo. Se ni gajnas la naskiĝon en purlando per la konfeso por konvertiĝo matene kaj vespere en tutaj aferoj, la originala voto kiu estis ĵurita por savi nin kaj ne forlasi, estus senuza ekzisto, ĉar la vivo de homo estas limigata kiel enspiro ne atendas elspiron, sekve ni ne povas fari la konfeson de konvertigo, aŭ starigi la moralojn de obeemo kaj pacienco, antaŭ la tempo kiam ni devos sperti nian vivan finon, ĉu ne? Eĉ se iuj diras per buŝo ke ili kredas la votan forton, tamen ili pensas en koro ke la voto kiu savas malbonulojn estas mirinda kiel dirite, sed espereble savus nur bonulojn. Tial ili dubas la votan forton kaj al ili mankas la kredo de ali-forto, sekve ili naskiĝos en ekstrema lando. Tion ĉi ni tre bedaŭras. Kiam la kredo decidiĝas al ni, la naskiĝo en la purlando estas aranĝita de la Budho Amita, kaj ja tio ne estas tute nia aranĝo. Se ni pli firme kredas la votan forton pri nia malbono, koro de la obeemo kaj pacienco aperos al ni laŭ natura rezono. Ni ne havus la penson “mi estas ŝaga” por la

naskiĝo en purlando pri ĉiuj aferoj. Nur ĉarme ni ĉiam devas rememori la profundan gravan favoron de la Budho Amita. Do, ni nature povas voki la Budhan nomon. Tio ĉi estas la naturo. La naturo estas trans mia egoisma peno, nome la ali-forto. Dume tie estas la pedanto kiu diras ke la naturo aparte havas malsaman signifon. Tio estas mizera ideo, mi pensas.

Ĉapitro 17

Iuj homoj diras jene: "La homoj kiuj naskiĝas en la ekstrema lando, fine falos en la inferon." En kiu dokumento estas atentata ĉi tio? Tio estas tre mizera, ke iuj homoj kiuj afektas erudicion diras tiel. Kian komprenon li havas pri la sutro kaj ŝastro aŭ la sanktaj libroj? Mi aŭdis ke serĉanto de la sava vojo al kiu ankoraŭ mankas la kredo naskiĝos en la ekstrema lando por la dubo de la originala voto, kaj post kiam li rekompencis la pekon de dubo, akiros je la unua fojo la Budhecon de rekompencita purlando. Tial iuj sutroj precipe konsilas la naskiĝon en ekstrema lando por multaj homoj, ĉar tie la veraj kreduloj estas malmultaj. Kiam la homoj insistas ke ili falos en la inferon el la ekstrema lando, tio enfaligas la veran Budhon en falsecon.

Ĉapitro 18

Iuj homoj diras jene: "Laŭ pli aŭ malpli da nombro de la donacaĵoj por la grupo de Budhisto, ni fariĝos la Budho granda aŭ malgranda." Tio ĉi estas kio ne devas esti dirata k.t.p. Ankaŭ tio estas tre eksternormala. Unue ni pensas ke la kvanto de la Budho granda aŭ malgrada ne povas esti decidita. Iu sutro klarigas pri la korpa kvanto de la fondinta Budho en la paca komforta purlando, sed tiu estas la figuro de la rekompencita maniera korpo. Je la Budheco de la dharma naturo ne troviĝas la figuroj longa aŭ mallonga, angula aŭ cirkla, kaj la koloroj blua, flava, ruĝa, blanka aŭ nigra. Pri kio vi povas decidi la Budhan kvanton? Oni diras, ke kiam ni vokas la Budhan nomon, ni povas vidi la aliforman korpon de la Budho. Tiuokaze ni vidos la grandan Budhon laŭ granda voko, aŭ la malgrandan Budhon laŭ malgranda voko. Ĉu eble ili diras la kvanton de la Budha korpo por tiu ĉi rezono? Ankaŭ ni povas diri ke tiu ĉi estas la pura donaca ago. Kvankam ni ĵetas la trezoron antaŭ la Budho, aŭ donas la monon al la instruisto, se kredo mankas, tio estas vana. Kiam ni ne donas eĉ paperfolion, aŭ duonon de mono, se ni povas havi tiel porfundan kredon kiel nia koro tute estas ĵetita al la ali-forto, ni certe decas al la originala signifo de la voto. Ĉu pretekstante al la Budha instruo, ili surprizas samideanon por kontentigi la ordinaran avarecon?

KONKLUDO

Ĉu tie aperas supre diritaj paragrafoj pro tio ke la kredo estas malsama? La mortinta majstro diris jene: "En la sama tempo de Sankta Honen, tie estas malmultaj samaj kreduloj inter liaj multaj disĉiploj, sekve Ŝinran iam diskutis kun iuj samideanoj pri la kredo. Kiam Ŝinran diris ke la kredo de Zenŝin estas sama kun la kredo de Sankta Honen. Kontraŭ tiu ĉi amikoj, Seikan-bo, Nenbucu-bo k. a. pretendis ke la kredo de Sankta Honen ne estas sama kompare kun la kredo de Ŝinran. Do Ŝinran respondis jene: 'Se mi dirus ke mi estas unu kun la granda saĝo de Sankta Honen, tiu eble estus eraro, sed la kredo de la naskiĝo en la purlando estas tute unu kun Sankta Honen.' Kvankam Ŝinran repondis tiel, ili ne

aprobis tion. tial fine proponis la detalojn al Sankta Honen por decidi ĝustecon aŭ malĝustecon de ambaŭ. Tiam Sankta Honen diris ke la kredo de Genku estas la donaco de la Tathagato, ankaŭ la kredo de Zenŝin-bo estas la donaco de la Tathagato, tial ambaŭ estas nur unu, kaj ke se iu havas malsaman kredon, li ne povos naskiĝi en la sama purlando, en kiu Genku naskiĝos." Mi pensas ke inter la kreduloj, kiui deziras ekskluzive la veran vojon, tiutempe estis multaj disĉiploj kiuj havis malsaman kredon kun Ŝinran. Kvankam ĉiuj miaj ripetaĵoj estas tedaj paroloj, mi skribadis devige. Havante la momentan vivon kiel la roson sur verkinta herbo, mi aŭdis la dubon de samideanoj kiuj volas kredon, kaj diris al ili la rakonton de la Sankta Ŝinran. Sed mi lamentas ke post mia morto, la instruaĵo de mia majstro malordiĝos. Se vi estos deflankigita de tiaj herezuloj, vi devas legi la sanktan libron kiun la mortinta majstro aprobe rekomendis. Ĝenerale, pri sankta libro estas ambaŭ vera kaj provizora, tial ni devas elekti la veron forĵetante la provizoron. Tiu ĉi estas la propra intenco de la Sankta majstro. Certe ni ne devas fari eraran legadon pri la sankta libro. Mi aldonis en tiu ĉi libro iom de grandaj atestaĵoj, kiujn mi elektis el la sanktaj libroj kiel la normo. Sankta Ŝinran ĉiam diris iene: "Kiam mi pripensas meditadon dum kvin kalpoj de la Budho Amita, tio estas nur por savi unu personaon min, Ŝinran. Kiel dankinda estas la favoro pri kiu la Budho Amita pensadis por savi min mem kiu havas iom da malbonaj agoj! Kiam mi nun pripensas pri la majstra diro, tio tute ne diferencas de la karega parolo de Ĵendo. Ĵendo diris ke li estas ordinara homo kiu havanta multajn pekojn daŭre naskiĝas kaj mortas, kaj de post senlimaj kalpoj ĉiam subakviĝante kaj vagadante inter iluzaj mondoj, ciam ne havis la ŝancon eliri el la mondo de naskiĝo kaj morto. Tial la majstro favore akceptis al si mem tiun diraĵon, kaj lia vivdaŭra peno estas por sciigi la favoron de ali-forto al la perpleksaj homoj kiuj ne pensas pri sia profunda peko kaj ne scias la altan favoron de la Tathagato. Anstataŭe mi kaj la aliaj reale ne diras pri la Tathagata favoro, diras nur pri afero bona aŭ malbona. Sankta Ŝinran diris: "Mi tute ne scias ambaŭ bonon kaj malbonon, ĉar se mi tiel perfekte scius kiel la Tathagato pensas en sia koro ke ĉi tiu estas bona aŭ tiu estas malbona, mi povus diri ke mi scias ambaŭ bonecon kaj malbonecon. Sed tamen mi estas oridinara homo havanta pekeman pasion, kaj ankaŭ la mondo estas nekonstanta kiel brulanta domo. Ĉi tie estas nenio krom mensogo kaj fikcio. Sed nur la vokado de la Budha nomo estas vera en tiu ĉi mondo." En tiela mensoganta mondo, mi sentas precipe malĝojan aferon, ĉar kiam rilate al la vokado de la Budha nomo, la homoj reciproke demandas kaj respondas pri la signifo de la kredo, aŭ konsentigas aliajn, por fermigi alian buŝon kaj ĉesigi la disputon ili insistas dirante "Ĉi tiu estas vera diraĵo de majstro Ŝinran." Sed kontraŭe Ŝinran neniam diris tion. Mi bedaŭras mizere ĉi tion. Tiun ĉi ni devas bone pensi, kompreni kaj atenti. Supre diritaj punktoj ne estas privataj aferoj, sed ĉar mi ne scias la sistemon de sutro kaj ŝastro, ankaŭ ne povas kompreni la profundecon de la dharma frazo, vi, legantoj povas senti strangon. Tamen laŭ mia memoro mi devas skribi centonon de la rakonto, kiun majstro Ŝinran parolis. Malgraŭ tio ke ni feliĉe vokas la Bubhan nomon, se iuj el ni ne naskiĝas en la rekompencita purlando kaj gastas en ekstrema lando, kiel malĝojinda tio estas! Do, mi skribis tiun ĉi kun larmoj por havigi saman kredon al la samideanoj en unu ĉambro. Mi titolas "Tanniŝo" ĉi tiun. Bonvole ne elmontru tiun ĉi libron al la eksteraj homoj.

POSTSKRIBO

En dinastio de Gotobain, Sanktulo Honen fondis la Nenbucu-sekton de ali-forta originala voto. Tiutempe sanghoj de Kofuku-templo procesis kontraŭ tiun ĉi. Iom da disĉiploj faris maljustan agon, sed pri tio estas la rezono. La homoj kiuj estis kondamnitaj pro malvera famo estis jene. (1) Sanktulo Honen kaj liaj sep disĉiploj estis punitaj je ekzilo, kaj al kvar disĉiploj aplikiĝis je mort-puno. Sanktulo Honen estis ekzilita al Hata de provinco Tosa, kaj lia punnomo estas Fuĵii Motohiko, viro, k. a. Lia aĝo estis sepdek ses jaroj. (2) Ŝinran, al provinco Eĉigo, lia punnomo estas Fuĵii Joŝisane, k.a. Lia aĝo estas tridek kvin jaroj. (3) Ĵomonbo, provinco Bingo. Ĉosai Ĵenkobo, provinco Hoki, Kokakubo, provinco Izu, Gjoku, Hohonbo, provinco Sado. Kosai Ĵokakudo, Ĵennebo, du homoj estas same kondamunita je la ekzilo, sed Daisoĵo Ĵendai de Mudo templo ricevis tiujn de depono, k. a. Supre diritaj homoj estis ekzilitaj k. a. La homoj ekzektitaj estas jene, 1) Saii Ĵenŝakubo, 2) Soganbo; 3) Ĵurenbo, 4) Anrakbo. Tiu estis informo de Niihoin Sonĉo. La kortego donis laikan nomon al Ŝinran aliigante la situacion de sangho, tial li nomiĝis per litero “Toku” kaj raportis al la suvereno. Lia dokumento nun ekzistas en Geki oficejo k. a. depost ekzilo, li uzis la nomon “Gutoku Ŝinran” en siaj ĉiuj verkaĵoj.

Super skribita tiu ĉi libro estas la grava Sankta libro en nia sekto, tial vi ne povas rekte doni tiun ĉi por la homoj, kiuj ne havas profundan rilaton. Sakya Rennjo (signo)

POSTPAROLO de la tradukinto

Nun mi havas la aĝon de sepdek kvin jaroj. Antaŭ kvin jaroj mi apenaŭ eklernis Esperanton. Ĝis tiu ĉi tempo mi ne sciis eĉ unu literon de Esperanto. Feliĉe mi estas favorita de la saneco kaj krom tio S-ro S. Asano ĉiam korektis mian tradukon. Tial spite mian maljunecon mi povis progresi en Esperanta memlerno. Mia intenco de Esperanta lerno estis por la propagando de Ŝinranismo. Jen estas "Tanniŝo" kiu estas la gvida libro de kreda ideo kaj ankaŭ estas "La Kodo de kronprinco Ŝotoku" kiu estas la moralo de kreda vivo. Tial mi tradukis tiujn ĉi du librojn en la jaroj 1958-1960. Kvankam mia traduko ne estas kompleta, sed tiuj ĉi du tradukoj estas miaj elkoraj oferaĵoj pro memoro de la granda festo kiu okazis por sepcent-jara datreveno de Ŝinrana morto, ĉar Ŝinran diris ke ni devas egale propagandi la originalan voton de la Budho Amita dek-direkte. Esperanto kiu estis kreita de D-ro Zamenhof funkcias je ĉiuj regnanoj en la mondo, tial la Esperanta Tanniŝo povas respondi al la postulo de Ŝinran, mi pensas. Sed miaj tradukoj estas neperfekta. Sekve mi timas ke ĝi erarigos la ĝustan doktrinon de Ŝinran. Mi esperas ke postaj anoj denove faros la perfektan tradukon pri tio. Fine mi dankas bonkorecon kaj helpon de S-ro S. Asano, ankaŭ dankas al S-ro Ŝ. Okita kiu prenis la malfacilan presan respondecon. Denove mi dankas la subtenadon de samideano.

K. Sasaki
La 1an Malto 1961